# JEN

BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

Numero 7 — Marto 1963

Sendu kotizojn al: S. COHEN, 16 Long Ave., Allston, Mass.; ĉion por redakcio al: K. MINER, 42 Ave. B, NYC 9; ĝeneralaĵojn al: R. KOLLIN, 30 Ave. B, NYC 9, N.Y. --- JARABONO: $1.00 aŭ egalvaloro.

## AL TEJO

Vane vivdaŭras postmilite viro
Kies amatino jam pereis;
Vane postmilite sonas liro
Kies belon nigra ombro neis.

Ĉu la kordoj ne privibras homan sangon?
Ĉu la amo ne ekkonas melodion?
Sed la bombo paralizas ĉies langon,
El kuraĝo faras vantan parodion.

Estas do la hor' de barpenetra menso:
Ne plu ni kaŭru en subteraj haloj
Dum antaŭtimoj tremas tra la penso
Dank' al potencveto de rivaloj.

La junularo firme staru en ĉi-horo
Kiu estontecon novkomencas:
Distingu nin nenia ena moro
Krom tiu de la homo, kiu pensas.

-- KLM

## 1963 -- JARO DE LA JUNULARO: ĈU TIO VERE GRAVAS?

La fakto ke UEA nomis 1963 la Jaro de la Junularo en la Esperanto-movado kaj donis sian benon al grandskala plano de pli intensa agado flanke de TEJO, estas evento kiu tuŝas ĉiun unuopan Esperantiston, kaj tute speciale ĉiun junan Esperantiston. Superflue diri ke ĉar ĉi tiu estas nia jaro ni uzu ĝin bone; superflue diri ke dum ĉi tiu jaro kiam la publika atento ĝis nekutima grado turniĝos sur nin, ni celu al eĉ pli utila kaj fruktodona laboro; superflue diri ke serioza laboro dum la nuna certigos la simpatian atenton de la Esperantistaro dum postaj jaroj. Ĉion ĉi ni bone komprenas, ni gejunuloj. La demando, tamen, estas, kiel plej bone utiligi ĉi tiun gravan rekonon al la Esperantista junularo.

La kampanjon Jaro de la Junularo UEA metis en la manojn de TEJO, kaj aparte ties estraro. Inter la diversaj planoj kiujn ni faris por la Jaro estas menciendaj la jenaj:

1. Pli intensa agado cele al pli bonaj ligoj kun neesperantistaj junularaj organizoj.
2. La preparo de bazaj artikoloj pri la Esperantista junularo kaj ĝiaj problemoj, kaj de dokumentoj de CED pri similaj temoj.
3. La prepara laboro por la eldono de internacia junulara revuo tute en Esperanto. Provnumero de la gazeto aperos dum la somero, kaj regula eldonado komenciĝos venontan januaron.
4. Eldono de broŝuro pri TEJO. ties landaj sekcioj kaj la junulara Esperanto-movado.
5. Instigo al landaj asocioj fondi junularajn sekciojn kie ili ne jam ekzistas.
6. Per ĉiuj eblaj rimedoj konvinkigo de la Esperantista publiko pri la graveco de la junularo en la ĝenerala Movado, kaj pri la preteco de la Esperanto-junularo ludi ankoraŭ pli pozitivan rolon en la disvastigo de Esperanto.
7. Intensa varbado por Esperanto kaj precipe por TEJO.

Jaro de la Junularo.... (daŭrigo)

Nu, ĉi tiuj planoj ne estas simple la propraĵo de la eta grupo de aktivuloj kiu preparis ilin: ili estas la propraĵo de la tuta Esperantista junularo, ĉar TEJO reprezentas kaj respegulas la tutan Esperantistan junularon. Kiel forta pruvo de tiu fakto, la junularo entuziasme akceptis kiel la sian la projekton Jaro de la Junularo -- kaj samtempe portis al ni (kelkfoje tute sendepende de la TEJO-estraro) kelkajn el la plej grandaj sukcesoj depost pluraj jaroj. Mi donu ekzemplojn --
- Dum kelkaj jaroj la nombro de TEJO-sekcioj tra la mondo restis relative fiksa ĉirkaŭ 11 landoj en du kontinentoj. Sed dum la pasintaj kelkaj monatoj ekestis sekcioj en Usono, Danlando, Belgio kaj Japanio -- do 15 sekcioj en kvar kontinentoj -- kaj estis signoj de aktiveco el ankoraŭ tri landoj, unu en Sudameriko.
- Samtempe, en Germanio okazis denove sukcesplena Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo kun 60 partoprenantoj el 9 landoj.
- Ankaŭ en aliaj landoj (en Hispanio, en Belgio, en Svislando, en Britujo) la Esperantista junularo lastatempe okazigis sukcesajn renkontiĝojn.
- El Bulgario venis novaĵoj pri intensa preparo por la venonta TEJO-Kongreso en Vraca, kiu certe estos mejloŝtono en la historio de TEJO.

Ĉio ĉi ŝuldiĝas al nova ondo de entuziasmo kiu nuntempe trairas la tutan Esperantistan junularon. Paroli entuziasme pri venkoj ktp. estus je ĉi tiu stadio ne realisma; sed estu certa pri la jeno: TEJO planis ĉi tiun Jaron i.a. por montri ke la junularo kompetentas - sed la junularo per la ĉi-supra agado jam en la unua monato de la Jaro montris tion! Ni rajtas fieri kaj ni rajtas pli konfide plueniri.

Kaj kion faris ĝis nun TEJO, cele al realigo de siaj planoj? Agadon ĉe neesperantistaj junularaj organizoj oni jam komencis, sub gvido de estrarano respondeca aparte pri pri ĉi tiu projekto; materialon por la dokumentoj de CED oni nun preparas; la broŝuro pri TEJO tre baldaŭ eldoniĝos -- eble jam eldoniĝis; la unuajn paŝojn faris la estraro por instigi al landaj asocioj fondi junularajn sekciojn; artikoloj komencis aperi en la gazetaro; favoraj reagoj flanke de la publiko abundas. Evidente, la junulara gazeto estas samtempe unu el la plej grandaj kaj unu el la plej malfacilaj planoj de la Jaro. Nia unua tasko estas kolekti monon por la eldono de provnumero kaj por doni al ni financan rezervon por la komenca periodo de eldonado. Tiucele UEA kaj TEJO starigis la Fondaĵon Junulara Gazeto**kiel oficialan fonaĵon de UEA.

Kaj niaj taskoj dum la Jaro de la Junularo? --
UNUE subteni nian landan sekcion --J:E.N.
DUE subteni la planatan junularan gazeton per donaco al la Fondaĵo Junulara Gazeto.
TRIE labori en loka medio, varbadi, informadi, konvinki.
KVARE subteni TEJO

Ek, geamikoj! Ek al laboro!

** Vidu detalojn en la pasinta numero de JEN-Bulteno. Usonanoj sendu kontribuaĵojn por la Fondaĵoj rekte al la kasisto de TEJO, Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass.

-- Humphrey Tonkin

POLA ESPERANTO-JUNULARO.... KELKAJ FAKTOJ

Ni pardonpetas al Marius Dastych pro jenaj eraroj en nia teksto:

par. 2, linio 2: "En 1953 PEJ plenumis..." devus esti "En 1959 PEJ plenumis..."

par. 4, linio 6: "...ekskurzoj..." devus esti "...ekskursoj..."

par. 4, linioj 10, 11: "Marek Pietrzak estas vic-prezidanto de TEJO..." devus esti "Marek Pietrzak estas Ĝenerala Sekretario de TEJO..."

# ~ OPINIO ~

Kara Redaktoro,

Mi legis kun intereso la leteron de s-ano Pollock (jan. n-ro). Certe li pravas ke Zamenhof estis "homaranisto en la plej bona senco de la vorto." Tamen mi devas aldoni al tio:

Privat skribis ke Z. ne konsentis al ateismo, sed ne ĉar ĝi estas "anatema," sed nur ĉar ĝi ne proponas kredon. Tamen homaranismo lasas al ĉiu homo plenan liberecon havi tian internan kredon, kiu ŝajnas al li plej bona, kaj nur starigis neŭtralan eksteran kadron. Oni povus do esti ateisto kaj homaranisto se oni dezirus.

Mi opinias ke Z. pravas, ke ateisto estas malkredanto. Sed oni povas malkredi je dio kaj tamen kredegi je multaj aliaj veraj valoroj. Tiel mi estas kredanto. Fakte, eĉ ateistoj kelkfoje parolas pri fido al dio sed ili ne pensas pri la Eternulo de la Malnova Testamento. Ili pensas pri la bonaj koroj de homoj, pri la eterna valoro de amo, beleco, frateco kaj multo pli. Mi opinias ke Z. malkredis je la Eternulo sed kredis je la sama dio de ni ateistoj, nome, la homa animo en ĝia plej bona stato.

Se oni diras, ke vera ateisto ne ekzistas, la ateisto certe povas diri, ke vera eternulkredanto ne ekzistas. Rigardu la mondon.

-- E. G. C.

---

Al vi ĉiuj, individue kaj kolektive, SALUTOJN!

Mi legis kun tuta intereso la numeron de JEN-Bulteno, kiun mi ricevis abone, kaj gratulas vin pro la enhavo kaj la evidente granda zorgo kiun vi montras per la lingva boneco kiu karakterizas vian eldonaĵon.

S-ro Marius C. DASTYCH, raportante pri la Pola Esperanto-Junularo, metas en la unuan lokon de la obstakloj kaj malfacilaĵoj, la'malaprobo fare de la ĝenerala "oldula" movado! De la komenco mi aprobis kaj laŭdis vian entreprenemon, kaj nun mi dezirus eĉ pli materiale ĝin subteni...

D. E. Parrish
Ĉef-deligito de UEA
Los Angeles, Kalif.

[Ne retorike s-ro Parrish parolis pri materiala subteno: li fariĝis nia unua dumviva abonanto-apoganto! Estas alia lando, ĉu ne, s-ro Dastych? --Red.]

---

SALUTON!

Dum la lastaj kvin-ses jaroj ekde mia esperantistiĝo mi multe deziris, ke organizaĵo kiel JEN komenciĝu. Nun ĝi estas fakto, kiu meritas la subtenon de esperantistoj ĉie; ne nur tio, sed ankaŭ aktiva varbado de esperantistoj ĉie pliigu ĝian membraron. Mia influo inter skoltoj-esperantistoj estas malgranda, sed ĝi utiliĝos por krei aldonajn membrojn kaj instigi aktivan partoprenadon en tiu ĉi nova, promesa junulara grupo.

-- C. Stanley Otto
Bloomfield, N. J.


Mendu viajn librojn de
ESPERANTO LIBRO-SERVO DE JEN
P.O.Box 315
Brooklyn 11, N. Y.

ampleksa stoko - rapida ekspedo

JEN-ELNA KONGRESOJ
en Pittsburgh
-5a-7a de julio 1963-
vidu detalojn
en la venonta numero

---

DANKON al Esperanto Scientific Center pro uzo de tajpilo kaj ceteraj utilaĵoj.




Jam de 1948 provizas la diskentrepreno FOLKWAYS aŭtentikajn specimenojn de la muzikoj kaj moroj de mondaj popolkulturoj. La kompanio FOLKWAYS do kontribuas grandskale al reciproka kompreno kaj sana scivolemo inter la nacioj. Ĝia produktado de ĝis nun 1,000 titolojn de folkloraj diskoj metas ĝin inter la plej elstarajn potencojn por paco kaj pli alta grado de civilizo, en la plej bona senco de tiu vorto. Mendu katalogon hodiaŭ - vi trovos mil trezorojn!

FOLKWAYS RECORDS CORP., 121 W. 47th St., New York, N.Y.

## ELKORA MESAĜO -- AL NIAJ APOGANTOJ

De nia fondiĝo en aŭgusto 1962 ĝis nia aktuala ankoraŭ embria stadio, netakseblan financan kaj spiritan helpon donis niaj apogantoj. Se vi troviĝas en tiu nobla nombro de sinceruloj, akceptu de ĉiu JEN-membro tre koran dankon. Sen vi, nia ĝisnuna progreso - pri la kompletoj (Esperanto-Kits), pri nia aliĝo al TEJO, pri nia plifirmigita organiza strukturo, pri nia diversflanke pozitiva agado - estus neebla. Eĉ la fakto, ke vi nun havas nian JEN-Bultenon en viaj manoj, ŝuldiĝas al vi. Vi vidis bezonon, kaj vi senprokraste kaj nedubeme respondis tiun bezonon. Respekte kaj danke ni do honoras

BARKLEY, Margaret L. — Palo Alto, California
CASTO, Joseph H. — Altadena, California
DONEIS, Armin F. — Pharr, Texas
DUNCAN, Thomas — Brookline, Mass.
ENGLANDER, Alfred — St. Louis, Mo.
HIGA, Ŝinĉo — Honolulu, Hawaii
PARRISH, D. E. — Los Angeles, Calif.
REICH, B. W. — Brooklyn, New York
SCHULZE, Catherine — Hillsborough, Calif.
VERPLOEG, Ken K. — Spokane, Washington
WALTER, Winnifred E. — San Francisco, Calif.

Ĉu vi ankoraŭ ne estas apoganto? Via helpo urĝe necesas, por ke ni daŭrigu nian entreprenadon. Apoganto de JEN estas plenaĝa nemembro, kiu helpas nin per

DONACO de $5.00 aŭ pli (aŭtomate ricevas Bultenon).

Alie, oni povas aboni al la JEN-Bulteno ($1.00 jare).


### SCIENCA ESPERANTO-CENTRO OFERAS RESTADON EN USONO AL SPERTA ESPERANTISTINO

Ofero de restado en Usono al studentino, kiu helpos en valora laboro de grava E-organizaĵo antaŭ unu jaro starigita en Novjorko, en rilatoj kun la E-Klubo de UNO, por larĝskale disvastigi la I. L. en universitataj kaj sciencaj rondoj en Usono kaj UNO:

Ŝi kunlaboros en vasta agadplano: redakcia laboro de diversaj E-publikaĵoj, radio-kaj televid-programoj, intervjuoj (ankaŭ partoprenos en ili), gvidado de E-kursoj, ktp.

Rekompence ŝi povos resti 6/12 monatojn (eĉ pli longe) en Novjorko kun ĉiuj elspezoj pagitaj ĉi tie (ne la vojaĝo), lerni aŭ perfektigi la anglan, hispanan kaj francan-lingvojn kaj koni la landon. Por kapabla juna kaj agema E-istino nur, bona tajpistino (dez. ankaŭ kun steno en E), kun plaĉa voĉo por sonbendigoj kaj bona aspekto por publikaj aperadoj, prefereble loĝanta en okcidenta Eŭropo.

Skribu kun ampleksaj detaloj pri studoj finitaj, lingvoj parolataj (germana kaj rusa interesaj), kvalifikoj, aĝo, nacieco, foto, ktp.

F. Martínez, Komisiito de UEA ĉe UNO, Esperanto Scientific Center, 130 W. 57th Street, New York 19, N.Y.,

Represo petata

## KIO ESTAS NOVA? --

--Neniu ensendis solvon pri la interesa eraro en la Empire State Building-reklamo. Nu, eble ni tro fanatikas pri lingvoj -- sed temas pri "wunderlÿk." La vortfinaĵo -lijk estas propra al la nederlanda lingvo, kaj respondas al -lich en la germana, -ly en la angla, ktp. Sed en Belgujo oni skribas tiun ĉi finaĵon -lyk. La kompilanto de la listo, enketante pri la pravaj adjektivoj, sendube akiris manskriban varianton de la nederlanda *wunderlijk*, nebule memoris pri la flandra -lyk, kaj fuŝinventis novan literon: ÿ !

--KIAM JEN AKIROS 100 MEMBROJN - tiam B. STOLLMAN malfermos la botelon da "Cutty Sark" kiun li ricevis de la Kristnaska Loterio de JEB (Junularo Esperantista Brita). Per ĉies helpo ni ja havos tiom da membroj -- en 1963! Ni nun havas 50.

-- Laborado pri la Esperanto-Kompletoj ("Esperanto-Kits" menciitaj en la 5a n-ro) ankoraŭ, kaj eĉ iom pli rapide, progresas.

--Peter LA FARGE, folkkantisto, distris nin ĉe la lasta festeto de JEN (Novjorkanoj) la 3an de februaro per iuj popolkantoj (inkluzive indianajn social-protestajn kantojn) el sia ampleksa repertuaro. Oni povas aŭdi Peter ankaŭ per diskoj Columbia kaj Folkways. J. BLITZ tre talente aktoris "Die Lorelei" de Heine kaj la fantom-scenon el "Hamleto," montrante ne nur sian propran kapablon sed ankaŭ la belecon de la esperantaj tradukoj.

--Karavano de Amikeco en la okcidenta parto de Usono! S-ro Tom DAVIDSON de Portlando veturos al San Francisko por interŝanĝi ideojn pri la E-movado en Usono kaj pri klubaj aferoj. Li estos tie dum la "Printempa Ferio" en marto kaj restos tie unu semajnon parolante kun membroj de la diversaj E-kluboj en Nord-Kalifornio kiel estrarano de ESPO en Portlando.

--Esperanto-klubo de Universitato Columbia, gvidata de Harriet MANDELL kaj Barry AUSTERN daŭre kreskas. Vidu detalojn en la venonta n-ro.

---

Unu el la plej ĉarmaj ŝatokupoj de esperantistoj (kaj eĉ de analfabetoj) estas amatora psiko-analizado. Tiel okazas, ke dum disputo inter du homoj, unu -vi povas veti- eventuale pridemandos la mensan sanecon de la alia. Nenecese diri, ke kiu tion unue faras, kutime venkas. Ho glora scienc-epoko...

==================

"Vilĉjo, vi estas paranojulo."
"Tute ne."
"Vidu; vi ĵus pruvis ĝin..."

==================

Mais, ma, pero kaj sed
But - eterna kubuto de
la pensado-proced' ...
ĉiulingve obstinas...



"Atak-cirkulero venis hodiaŭ... kial vi ne diris al mi, ke vi iam studis Interlingua?"

# LA ESTONTA MUZIKO: KIEN ĜI IROS?

Antaŭnelonge mi aŭdis, per FM-radio dum malfrua nokto, iaspecan verkon de John Cage, moderna komponisto. Mi ne scias ĉu tiu ĉi verko povas esti nomata "muziko" aŭ ne. Ĝi inkluzivis kurantan prelegon de s-ro Cage, dum kiu kelkaj sonoj kaj bruoj estis aŭdeblaj. Ofte malplaĉaj bruoj, sed kelkfoje malseriozaj sonoj kiuj taŭgis por la prelego. La prelego mem estis pli-malpli humura. La bruoj ne ĝenis min, sed mi poste pripensis la vortojn de la verkisto kaj konkludis, prave-malprave, ke la stato de la nuntempa muziko ne estas tre bona.

Nu, certe mi ne estas reakciulo. Se mi amas la verkojn de Bach, Mozart, ktp. mi ankaŭ povas ĝue aŭskulti tiujn de modernaj komponistoj, eĉ tiujn de tiel junaj avangardistoj kiel Luigi Nono kaj Karlheinz Stockhausen. Tamen ili mem, kune kun aliaj tiuspecaj homoj, ofte verkas aĉajn komponaĵojn, kiujn miaj oreloj ne povas toleri. Temas ne nur pri la sentumo, sed ankaŭ pri la sentemo. Pri ambaŭ John Cage eble dirus, ke mia aŭdpovo ne evoluis. Li uzis la vorton "audition." Pri tio li diris, "Ni (nuntempaj altnivelaj homoj) nun evoluigis nian aŭdpovon." Kaj plue, "Antaŭe, oni aŭskultis nur kunrilatajn sonojn. Nun, oni povas aŭdi solajn, izolitajn sonojn, konstatante ilian valoron." -- Kian valoron? Ĉu iu ajn bruo havas valoron? Kaj specife, muzikan valoron?

Retorikaj demandoj, kompreneble. Miaopinie, iu sono havas valoron nur en rilato al aliaj sonoj. Eble, Cage troigas la aferon por forte emfazi sian punkton. Alie, unu izolita sono povas esti muzikaĵo, kaj komponisto bezonas nek talenton nek lertecon por ion verki. (La sama problemo ekzistas en la nuntempa etoso ĉe la pentrado ks.)

Tiu ĉi <u>reductio ad absurdum</u> ne solvas la problemon. La modernuloj havas sian propran teorion pri la muzika komponado kaj ĝia metodo. Laŭ Cage, tio devas esti "nedeterminita" -- lia vorto. Ĉu tiu vorto havas gravan signifon, mi ne scias. La verkoj de Cage mem ne estas ĉiuj nedeterminitaj. Kontraŭe, ili montras intence elpensitajn ecojn. Tamen, li kelkfoje preparas aron da cirkonstancoj kies rezulto estas hazardaĵo. (Vidu la konsekvencan hazardaĵon de pluraj radiaparatoj ĝustigitaj al malsamaj frekvencoj.) Hazarda rezulto ne necese implicas malplanon aŭ malintencon. Fakte, iu ajn speco de rezulto, ĉu hazarda aŭ ne, devas esti pli-malpli planita. Se oni volas konsideri la logikecon de tiu ĉi temo, oni devas konstati ke elekto de iu perilo, instrumento, aparato, ks. kontraŭas la ideon de "nedeterminita muziko."

Sufiĉe. Mi ne ŝatas sofismaĵojn. Oni povas facile disfendi harojn aŭ ĉikani pri iu ajn diskutebla termino. Oni devas ĉi tie paroli nur pri la estonteco de la muziko. Jen mia temo. Kia granda temo! Mi nepre ne povas elĉerpi tiel ampleksan temon. Anstataŭe, mi volas vage esplori kelkajn eblojn.

Al kio la muziko sin direktas? Komence de tiu ĉi jarcento, ĝis la fino de la dua jardeko, ŝajnis ke la muziko iras malantaŭen (preterpasante la deknaŭan jarcenton) kaj revivigis la formojn kaj ideojn de la klasika epoko. Oni parolis tiam pri "Nov-klasikismo." Samtempe, forlasante romantikajn ideojn de la 19a jarcento, komponistoj forĵetis regulojn, kiuj limigis ilin. Schoenberg aperigis la 12-tonan (netonalan) sistemon. Multaj poste sekvis liajn principojn. Depost tiam, la muziko movis plu foren de la tradicio.

Oni jam forgesis la harmonion. La melodio ne nun taŭgas. Eĉ ritmon kaj takton oni malofte bezonas. Iom post iom, tradiaj muzikiloj malaperos. Ni havas sonbendojn, ĉu ne? Ni havas elektronikajn maŝinojn, kaj "preparitajn" pianojn. Ordinara instrumento iĝos anakronismo. Baldaŭ, iu muzika sono havanta regulan vibradon ne decos. Nur bruoj plaĉos al sentemecaj oreloj. Aŭ eble ne. Eble nenio plaĉos al ili. Fine, riaj notoj signifos nenion. Pli kaj pli la silento inter sonoj pli longiĝos. Oni povos aŭdi izolitan sonon, kaj post duonhoro, la sekvontan malsampiĉe. Aŭ sampiĉe -- oni ne povos memori la pasintan tonon.

Finfine, la tempa spaco inter aŭdeblaj sonoj daŭre kreskos. Oni pli kutimos aŭdi nenion ol aŭdi ion. La sonoj ĉesos. La estonta homo ridetos kiam li legos pri la ĝoja muzika aŭskultado de siaj prapatroj. Kaj li skuos la kapon scivolante kiel homoj povis toleri tian konstantan bruadon.

-- John F. Kooistra

Ofte en la ĝentila (t.e. nekomunika) konversaciado ni aŭdas la terminojn "idealisma," "romantika," "subjektiva" kc. kontrastigataj al la terminoj "realisma," "objektiva," "racia." Nun ne estas taŭga tempo esplori iliajn historiajn signifojn: tio postulus jarkolekton da Bultenoj. S-ron Newell mi volas uzi kiel ekzemplon de homo, kiu ne konstatas la najbarecon inter plena objektiveco kaj nevola frenezo. Se li kuraĝas tiel ĝisfunde ekzameni la socion, protektate nur de sia scienca metodo (ne tre utila kiraso, kiam temas pri la psiko) mi esperas al li bonŝancon. Mi tute ne mokas: mi esperas al li bonŝancon.

Dume, la stranga ŝipo de-civiliza evoluado - kun ni esperantistoj kiel pasaĝeroj - antaŭen veturas. Ĝi veturas - verŝajne sengvide. Oni inventis neŭtralan kaj eksterkulturan lingvon, Esperanto, Kiu gvidis Esperanton al ĝia nuna stadio? Ĉu la gvidinto estas la idealismo? Ne. La idealistoj elfandis alian, pli idealan, pli racian kaj sciencan lingvon, Ido. Ili ne sukcesigis tiun idealaĵon. La idealistoj en la E-movado jam transplantiĝis alien. Esperanto ne estas ideala lingvo. Ĝi simple estas lingvo, kaj ĝi estas bela, kaj ĝi kaptas la spiriton kaj ĝin neniam liberigas. Nu, lingvoj ne kutime faras tion, ĉu? "JES," mi aŭdas vin diri, "ĈE POETOJ."

Hm. Ĉu Esperanto do estas idealo - aŭ poemo? Ĝi ne povas esti ambaŭ aferoj, ĉar la idealismo kaj la poezio estas reciproke forigaj konceptoj: idealo restas konstanta dum unu generacio. Kunfratoj, respondu honeste: kiom da esperantistoj - ĉu junaj, ĉu nejunaj - vi renkontis dum la pasinta jaro, kiuj parolas pri ideala mondo? Kiuj revas pri fina akceptiĝo de Esperanto - ĉe gravaj instancoj? kiuj stelokule kaj amdelire elbuŝigadas buntajn pejzaĝojn de la estonta mondo de gloro, kies ĉiuj problemoj estos eksolvitaj per tutmonda adopto de la Lingvo Internacia Esperanto? Ĉu vi ja trafis unu-du tiajn?

Dancante sur la perimetro de Esperantujo, spektante la dramon, se tiel diri, oni povas pasigi multegajn jarojn en tuta nescio pri la efektiva iom surpriza manko de

---

## *Kontraŭ Idealistoj* .................... *Charles Newell*

Kial vi esperantiĝis? Evidente, vi jam ofte trovis tiun ĉi demandon, kaj respondis iel jene: "Mi kredis, ke..." aŭ "Ŝajnis al mi, ke..." kaj daŭrigis "la homaro devas iĝi unu granda familio per la sankta..." Ne necesas daŭrigi - mi scias: vi fervoras. Vi junumas. Viaj glandoj laboras dum ekstra tempo: kun entuziasmo, diligenteco kaj eĉ kolero vi senfine, senlace propagandas, diskutas, rezolucias kaj konvertas; sed dum la tuta tempo la hidrogenzj bomboj atendas paciençe sian horon. Kie estas via homara familio? Kie estas la glora estonteco? La amo, la altruismo de viaj sonĝoj, la malamo kaj la malfido inter la nacioj restas, kaj restos: kial? La kaŭzo estas tre simpla: la homa naturo; kaj jen la stumbligilo de ĉiuj idealistoj, inter kiuj, kompreneble, staras la esperantistoj.

En ĉiu generacio naskiĝas iaj kuraĝaj personoj, kiuj tiel profunde kredas je iaj idealoj, ke ili decidas dediĉi sian vivon, por plenumi tiujn idealojn. Bone. Sed la idealoj de unu generacio ĉiam malsimilas la idealojn de la sekvanta: el ĉi tio mi komprenas, ke la ĉirkaŭaĝo decidas la naturon de la idealoj, kaj nedaŭraj idealoj signifas malĝustajn. Krome unu fakto aplikiĝas al ĉiuj idealistoj: ili malkontentas, volas ŝanĝi la mondon. Preskaŭ ĉiuj aliaj personoj ne volas fari tion: plaĉas al ili la malnovo, la familiaro, kaj se ili nur havas plenan ventron kaj varman liton, ili kontentas. Jen sana besto: vi, miaj karaj gefervoruloj, estas malsanaj. La mondo tro multe pensas; ĉu viaj glandoj aŭ viaj mensoj malbonfunkcias, tio ne estas al mi decido.

Kio estas certa? La morto, la detruo ne nur de la homaro kaj la fino de ĝia historio, sed ankaŭ la detruo de la mondo. Ĉu tio okazos baldaŭ kaj rapide, per la helpo de la natura evoluo de la universo, tio ne gravas. La demando estas: ĉu ekzistas celo aŭ ne? Se la celo estas la agado mem, do bone: ili amuzu sin, se ili volas. Se unu fakto estas certa: homarismaj idealoj de la deknaŭa jarcento, kiuj figuras la ĉielon sur la tero, pereos, ĉar la estonteco havas limojn, - la homa naturo estas neŝanĝebla, kaj ĉiuj prudentaj homoj ĉiam sciis kaj scias tion. En la pasinteco oni esperis eniri la ĉielon; nun oni dubas. Nur la blindaj ĝojaj idealistoj iras konfide en la senliman estontecon. Kial mi skribis tion? Por ekspliki al ili en ilia propra lingvo!

-- el "KIAL NE?"

tradicia idealismo inter la verduloj. La lingvo tiom plaĉas, ke oni apenaŭ povas pensi pri celoj! Ĉio en la mondo, kio plaĉas, kreskigas kulton ĉirkaŭ si. La kulto de la esperantistoj estas la plej elstare interesa kulto, kiun mi iam vidis: sed kia rilato videblas inter kulteco kaj idealismo? Kulto formiĝas, kiam estas iu centra ideo kiun nur selekta grupo povas kompreni kaj ĝuadi. Idealo estas ideo ankoraŭ ne realigita -- do facile komprenata. Esperanto estas tre reala, ĝia ideo jam funkcias, ĝi staras je la dispono de iuj instancoj, kiuj volus ĝin utiligi.

Intertempe, la uzantoj de nia lingvo amuzas sin, asertas s-ro Newell. Tion oni ne povas nei! "Apprendre une langue, c'est vivre de nouveau." Ĉu eble plezuro estas malnobla, nedigna? Malnobla kaj maldigna, laŭ mi, estas sencesa troigado, eterna fanfaronado pri la mondskua graveco de nia afero, kompare kun kvieta kaj netruda polurado de la valorega juvelo kiu kuŝas en niaj manoj. Ni havas dirajon en la angla: li ne povas vidi la arbaron pro la arboj. La tradicia tendenco al propagandado estas tiel forta inter ni, ke grupo da esperantistoj parolante engrupe ofte ne povas paroli normale, sed nevole komencas varbi unu la alian. Jes!

Nu -- finfine ne temas nur pri sinamuzado. Strange -- sed tiel nature -- Esperanto eltiras la plejbonon el ni. Konante Esperanton ni ofte trovas en ni talentojn, sopirojn, pensojn tute ne atenditajn. Tian valoron la lingvo havas por la unuopulo, pruveble. La valoro, kiun ĝi havas por la mondo devas origini el ĝia valoro por la individual Esperantisto: oni ne povas arbitre krei valoron. La grundo de Esperantujo fekundegas: se ni havas kulton -- kion fari, se ne ĝin kulturi? Jen la afero, s-ro Newell. Sed kie estas via idealismo? Mi vidas nur ideojn!



"Ja estas bela lingvo, Pacjo;
morgaŭ mi starigos land-asocion!"

DEDUKTAJ DIFINOJ POR PAROLEMAJ PAPAGOJ, unua serio

Esperanto, subs. Lingvo, kiun oni uzas por diskuti tiun lingvon. En Usono, precipe limigata al salutoj kaj adiaŭoj. Karakterizata per abundo da prononceblaj mallongigoj.

Esperantujo, subs. Mita lando, en kiu oni malpermesas mencii politikon.

Esperantisto, subs. Diversspeca vivformo, genre karakterizata per sindediĉo al la gramatikaj principoj de l' universo. Kiam bonhumora, la besto parolas la lingvon Esperanto (vidu supre).

Movado, subs. La popularigado de la lingvo Esperanto (vidu supre) en danchaloj kaj brandejoj, sur stratanguloj, kaj en kelkaj lernejoj. Ofte klopodata per nekredeblaj rimedoj, kaj rimedata per nekredeblaj klopodoj.

Amatoro, subs. Homo, kiu ne posedas 4,536 oficialajn esperantajn radikojn.

Diletanto, subs. Homo, kiu ne posedas 4,536 oficialajn esperantajn radikojn, sed volas paroli.

Sincerulo, subs. Homo, kiu ne posedas 4,536 oficialajn esperantajn radikojn, sed volas paroli, kaj sukcesas.

Poeto, subs. Homo, kiu kapablas ignori 4,536 oficialajn esperantajn radikojn.

Konsultaj rilatoj, subs. Aranĝo, laŭ kiu se vi skribos al organizo A, vi ricevos informon pri organizo B, kaj inverse.

Interna ideo, subs. Iu ajn ideo, troviĝanta interne de la kapo de iu Esperantisto (vidu supre).

Deziras korespondi, v. Serĉas eblecon edziĝi, edziniĝi, translokiĝi aŭ vendi ion.

Stelo, subs. Organizo, monero, insigno aŭ libroserio. Kelkfoje memlumanta astro.

TEJO, subs. Misliterumo: Teejo. Respondas al "kafejo" en Britujo kaj Oriento.

Virino, subs. Ina viro, aŭ vira ino, depende de via metafiziko. Iom rara specio en Movado (vidu supre).

Instruisto, subs. Nova Esperantisto (vidu supre).

Centra Oficejo, subs. Privata domo de movadulo, enhavanta fakigskatolon kaj ruinigitan tajpilon.

Skatologio, subs. Studo pri fakigstatoloj.

Pacienculo, subs. Abonanto al "Nord-Amerika Esperanto-Revuo."

Komisiito, subs. Kompatinda malsaĝulo, kiu montris tro da entuziasmo je malprava tempo.

Argumenti, v. Diskuti en la lingvo Esperanto (vidu supre).

Beletra, adj. Eldonata de sur la Kanariaj Insuloj.

ALIĜU AL JEN
ALIĜU AL ELNA
ALIĜU AL UEA

## RAPORTO de la PORTLANDA GRUPO

SALUTOJN DE SOVAĜA OKCIDENT-USONO! En Portlando, Oregono, fondiĝis nova esperantista junular-grupo. La nomo de nia patra grupo estas ESPO (Esperanto-Societo de Portland, Oregon) do nia nomo estas ESPIDO. La ĉefa klopodo estas la bulteno de ESPO, kiun la junular-grupo ESPIDO presigas. La bulteno, nomita ESPILO, aperas ĉiun monaton antaŭ la monata kunveno de ESPO. Ĝi enhavas artikolojn pri la movado -- tutmonda, usona, kaj ŝtata. Ankaŭ ĝi estas anoncilo pri la venonta kunveno de ESPO. La junular-grupo kunvenas ĉiumonate antaŭ la kunveno de ESPO en la centra biblioteko de la urbo. Eble, ESPIDO presigos haveblan Progres-raporton pri la movado en Portlando ĝis la fondiĝo de ESPO en Oktobro 1961. La estro de ESPIDO estas s-ro Petro Dvorak. Se vi volas sendi bondezirojn al la grupo nova, la adreso de ĝia estro estas

5617 N. E. 27th Avenue
Portland 11, Oregono.

Ĉe loka gimnazio fondiĝis Esperanto-rondo. Ĝi estas la oficiala klubo de Jefferson High School, Portlando. La anoj studos kaj priparolos Esperanton kaj la movadon.

Planoj fariĝas por la unua Pacifik-Nordokcidenta Esperanto-Kunveno ĉe Mt. Ranier, Vaŝingtono. Oni kontaktas la ĉirkaŭ 500 esperantistojn en Okcidenta Kanado kaj en la Pacifik-okcidenta parto de Usono ink-e Kalifornion.

Bondezirojn al vi, de viaj samideanoj en Oregono!

-- Tom Davidson

* * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## NOVA KORESPOND-SERVO

Kun plezuro ni volus anonci, ke pro multaj petoj de niaj membroj kaj de eksterlandanoj, ni starigas korespondan servon. Tiu signifas ke de nun, ĉiuj JEN-Nordamerikanoj kaj TEJO-eksterlandanoj povas interkorespondadi per letero al:

Eŭgeno Calvert
167 East 2nd Street
New York City 9, N.Y., USONO (USA)

Li nun havas liston de personoj kiuj volas korespondi. Li sendos leteron de eksterlandano rekte al la JENano kiu plej bone taŭgas la postulojn. JEN-membroj! Hodiaŭ sendu vian nomon, aĝon, interesojn, al Eŭgeno por ke li povos aranĝi la interŝanĝadon. Tiu korespond-servo estas nur por JENanoj kaj eksterlandaj TEJO-anoj. Eŭgeno treege volas helpi vin trovi korespond-amik(in)ojn, sed kompreneble, li ne povas garantii ke la persono respondos. Skribu al li hodiaŭ kaj li trovos iun por vi!

\+ + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + +

## MATENA HUMORO - Ludoviko Totsche

Ĉu konas vi la ravon
de la krepusk' matena,
kiam la lit' katena
ne plu vin povas luli
en sonĝ-sino svena,
ĉar ja invadas ĉambron
tra l' mola dig' kurtena
la ĉirpa bru' solena
de l' birdarme' grandurba?

Ho, la luktado pena,
dum vi kun streĉ' muskola
forpelas la torporon
de la konsci' kontrola,
kaj liton forlasante
ŝancele la fenestron
per peza paŝo drola

en duondorm' aliras,
kurtenon flankenŝovas,
kaj al ĉi trobadora
koncerto, seninvite
- en noktĉemiz' frivola -
malsuprengapas sola.

Dum ĉi pepad' petola
frostige freŝa vento
kun glito de serpento
la korpon ĉirkaŭkuras:
kun trema tiklosento
la haŭto rememoras
pri l' gusto de knabaĝaj
matenoj jun-kuraĝaj,
kiam al ekskursanta
nudgamba skoltstudento

la solaj vojkunuloj
tra l' ŝtona strat-silento
estis ĉi trilo fajfa
kaj la karesa vento. . .

Sed jam de l' oriento
al ĉi krepusk-humoro
la sun' mortsagojn sendas,
la urba tagrumoro,
la harmonion fendas,
per sia bruo hirta
l' aŭror-koncerto birda
kun timo eksilentas,
la homo sin bananta
en freŝo, juna, solo
de ĉi tagiĝo kanta
la naŭze-tedan vivon
de l' griza tag' komencas
kun muskolstreĉo lanta.

REĜOJ KAJ REĜINOJ ja estis ĉiam interesaj - al tiuj, kiuj ne plu havas ilin. Kiam en 1957 Elizabeto IIa de Anglujo, kaj ŝia edzo Princo Filipo, Duko de Edinburgh, vizitis Parizon, la popolo ĝoje freneziĝis. Dum unu el iliaj veturoj sur la Champs-Elysées, dum la homamasoj kriadis "Vivu la Reĝino!" "Vivu la Princo!" la Princo turnis sin al Rene Coty, la tiama prezidanto de Francujo, kaj ridete rimarkis, "Kia domaĝo, ke vi francoj formetis la viajn!"

La landoj, kiuj ne havas reĝ-familiojn, devas aŭ prunti aliea, aŭ fari siajn proprajn. Estas ja sciata ke je la vojaĝo de la angluja reĝ-familio al Nord-Ameriko, la la usonanoj pli varme bonvenigis ilin, ol la kanadanoj.

Malfeliĉe, Reĝino Elizabeto havas propran hejmon. Kion do fari? Subita geedziĝo okazis! La Princo de Monako elektis nian "princinon", Grace Kelley. (Ne ridu! Por nereĝa lando, princo estas ja princo!) Tiam ni havis nian propran belegan, ĉarman kaj sveltan princinon. Sed malfeliĉe - ankaŭ ŝi foriris.

Ĉu? Ĉu ni, la plej grandega, demokratega lando en la universo, ne rajtas havi propran reĝ-familion? Silente kaj subkonscie, tuta Usono serĉadis - kaj egale silente, sed ne tute subkonscie, certa familio preparis sin...

En Bostono, Massachusetts, estis familiego, nome Kennedy, kiu aŭdis, aŭskultis kaj pretervole obeis al la preĝoj de la usona popolo. Nun regas (neoficiale, vi memoru) reĝino, reĝkunulo (strange, la roloj interŝanĝiĝis), reĝinido kaj baldaŭ - sendube - la eta Princo John, Jr.

--Joseph Blitz

(Joseph Blitz estas la aŭtoro de ĉio, kio havas la subskribon "Jozefo Fulmo". Tiu pseŭdonomo ne plu estos uzata. -Red.)

Junularo Esperantista De Nord-Ameriko
30 Avenue B
New York 9, N. Y.
United States of America

NEW YORK N.Y. MAR-7'63
U.S. POSTAGE 04
PB METER 107051